

**Provenca
Esperanto-Federacio
kvaronjara gazeto
146
aŭtuno 2026**



Leĝa depono ĉe BNF
ISSN 2609-5203

Federacia retejo
provenco.esperanto-france.org

Prezidanto
Rosy Inaudi - 06 18 35 18 40
r.inaudi@free.fr

Aliĝkotizo (kun la gazeto) : 12€

> ĉeko al : **Esperanto-Provence**
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Marc Gallardo

Les Hespérides II Bât. B2
67 bd des Alpes- 13012 Marseille
gallardomarc@gmail.com

06 09 89 09 14

> aŭ bankĝiro
(bankinformoj sendotaj laŭpete)

Por Esperanto-Marseille la kotizo
devas esti pagita al Esperanto-France
<https://esperanto-france.org>

Redaktoro
Pascal Panarotto - 06 26 34 30 93
ilarione13@outlook.fr

Grafikistino
Mh Bertuccelli
mhbortuccelli@gmail.com

**Limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°**
15-a de decembro 2026
bonvolu sendi al la supra retadreso

★ ★ ★

antaŭdankojn pro viaj kontribuadoj

Aŭtuno riĉa je renkontiĝoj, projektoj kaj Esperanto!

Ĉi tiu nova numero de nia Gazeto denove atestas pri la vigleco de nia movado. De Marsejlo ĝis Graz, tra La Ciotat, Esperanto estas praktikata, kundividata kaj, antaŭ ĉio, konigata.

Vi malkovros la novajn agadojn de Esperanto-Marseille kaj la belajn renkontiĝojn okazintajn dum la forumoj de asocioj, kiuj memorigas al ni kiom valoraj estas rektaj kontaktoj por veki scivolemon kaj doni deziron iri plu.

Granda parto de ĉi tiu numero estas dediĉita al la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graz: atestoj, personaj spertoj, rezolucio pri volontulado kaj daŭripova evoluo, sed ankaŭ historia retrorigardo al la esenco de esperantismo.

Vi trovos ankaŭ prezenton de nia Eŭropa Kongreso de Esperanto 2027 en Carry-le-Rouet, kaj pli distrajn rubrikojn: falsajn amikojn, humuron kaj, por fini, bongustan recepton de provenca daŭbo.

Bonan legadon al ĉiuj, kaj precipe... bonan Esperanton!

*La prezidantino
Rosy Inaudi*

En la gazeto n°144 mi diris «post la UK mi diros al vi miajn reagojn...»
Hodiaŭ, la UK vivis (1-8 an de aŭgusto 2026).

Tre aktiva, mi prepariĝis : Mi reprenis etoson de la unua UK en Boulogne sur mer 1905, mi relegis la libron «l'homme qui défia Babel»: Kutimaj paroloj (omaĝaj dankoj).

Poste, S. Michaux prezentis la patron de Esperanto : imagu ! silento en la salono, kaj Doktoro ZAMENHOF komencis : «Saluton karaj samideanoj...». Por la unuafoja, li parolis antaŭ Esperantista publiko. Hodiaŭ, la unuan de aŭgusto 2026, samaj anteparoloj kaj oni vokis Margareta Zaleski Zamenhof, parencino de sinjoro Lazare Ludwig Zamenhof tre aktiva en Esperanto, mi «rememoris» la silenton de 1905 kaj ŝia eta voĉo plenigis la salonon , kiam ŝi komencis paroli; ŝi parolis pri planedo, amikeco, paco;
Doktoro ĉeestis, mi estas certa.

Pascal Panarotto

Enhavo

3	Nova organizo de Esperanto-Marseille / Forumo de asocioj
4	Forumo de asocioj en Marseljo
5	Comment écrire un bon article pour notre gazette
6	Eŭropa Kongreso de Esperanto 2027
7	UK 2026: Plej bela kongresejo por plej koŝmara kongreso mia
8-9	UK 2026: Résolution du 111e Congrès mondial d'espéranto à Graz
10-11	Déclaration sur l'essence de l'espérantisme
12-13	UK 2026: Lingvaj malfacilaĵoj survoje al la UK
14-15	UK 2026: Persona gazeto de fervora esperantisto
16-17	Falsaj amikoj
18	La karotoj estas preskaŭ kuiritaj, sed ne Esperanto
19	Recepto
20	Agendo

Nova organizo de Esperanto-Marseille

Thierry Spanjaard - Prezidanto de Esperanto-Marseille

La gazeto Esperanto-Provence jam publikigis artikolon pri la nova organizo de Esperanto-Marseille en sia antaŭa eldono, sed la programo iom ŝanĝigis denove. Jen la lastaj informoj:

Du kursoj okazas ĉiun semajnon en Marsejlo:

- Thierry kaj aliaj gvidas konversacian rondon ĉiun mardon de la 18-a ĝis la 19-a en la Asociodomo, 93 La Canebière, 13001 Marseille.
- Didier gvidas kurson por komencantoj kaj komencintoj ĉiun ĵaŭdon de la 18-a ĝis la 19-a en la Asociodomo, 93 La Canebière, 13001 Marseille.

Nia kutima lingva kafejo okazos denove en alia loko kaj alia dato. Ekde oktobro, ĝi okazos la 2-an mardon de ĉiu monato, ekde la 19-a en la Grande Librairie Internationale de Marseille, 3 rue Vincent Scotto, 13001 Marseille. La venontaj datoj estas la 13-a de oktobro, la 10-a de novembro, la 8a de decembro, ktp.

Forumo de asocioj

33ème Forum des Associations à La Ciotat (13)

Renée Triolle

Parmi les 250 associations participantes, il est évident que Espéranto-la Ciotat est très connue et appréciée, une des rares associations à distribuer des documents informatifs: cette année, en plus du programme de l'association, de l'invitation au stage intensif à La Garde(83) les 7 et 8 novembre, la Résolution du Mondial de l'espéranto à Graz sur « Bénévolat et développement durable, » et l'article d'IPR sur « Espéranto et Paix », les visiteurs ont pu profiter de l'enthousiasme de Pascal qui a participé pour la première fois à une rencontre internationale cet été à Graz (Autriche), et visité le Musée de l'Espéranto à Wien ! Merci aussi à Rosy et Marc qui ont assuré toute la journée aux côtés de Patrick. Une quinzaine de personnes ont laissé leurs adresses. Certains visiteurs savaient que Renée Triolle a été élue sous les vivats de la foule « Membre d'Honneur de l'Association Universelle d'Espéranto » !

Forumo de asocioj - Marseljo 4/5

Marie-Hélène Bertucceli

Sabate, la 5-an de septembro, inter la 9-a kaj la 13-a horo, Christophe, Thierry kaj mi partoprenis en la forumo de asocioj organizita ĉe la Stadiono Vallier de la urbodomo de la 4-a kaj 5-a kvartalo de Marsejlo.

Malgraŭ malfacila komenco — ĉar oni ne informis nin, ke necesas antaŭa aliĝo — sinjorino (vestita per verdaĵo!) finfine trovis por ni tablon por nia prezento. Vere, estis multe malpli da budoj ol ĉe la evento «Vivacité», sed la vizitantoj ŝajnis pli alireblaj kaj dediĉis pli da tempo por interesiĝi pri la partoprenantaj asocioj. Tio ebligis al Christophe, Thierry kaj mi havi multajn konversaciojn kaj interagi kun diversaj homoj.

Por iuj, temis pri tute nova malkovro; ili eĉ neniam aŭdis pri Esperanto. Tial ĝi estis bonega okazo por prezenti nian lingvon, kaj ankaŭ la va-

lorojn de malfermiteco, kunhavigo kaj interligo, kiujn ĝi enkarnigas. Ĉe ĉiu interago, ni sentis nin kvazaŭ ni semus semon, esperante, ke ĝi iam ĝermos.

Pluraj homoj montris veran intereson pri la kursoj kaj lasis siajn kontakttinformojn, por ke ni povu plu komuniki kun ili (ni kolektis 24 kontaktojn, kompare kun 14 ĉe «Vivacité 2025»).

Ni finis la matenon plenaj de entuziasmo kaj kun la konvinko, ke eĉ ĉe malgranda foiro, ĉiu renkontiĝo povas helpi antaŭenigi la aferon de Esperanto!



Comment écrire un bon article pour notre gazette

Marie-Hélène Bertucceli

Un bon article doit avant tout donner envie d'être lu en étant clair, vivant et accessible. Pour cela, il est important de trouver le bon équilibre entre le texte et les photos.

La longueur de l'article dépend de la mise en page :

- 1 demi page doit comporter entre 110 et 130 mots.
- Une page avec une photo entre 210 à 230 mots.
- Deux pages avec 3 ou 4 photos entre 370 et 500 mots.

Ici nous privilégions les articles de 2 pages maximum pour pouvoir laisser la parole à tous.

Ces indications permettent d'adapter le contenu à l'espace disponible et de conserver une mise en page agréable. Il est toutefois préférable de privilégier les photos lorsqu'elles sont pertinentes. Une belle image permet d'attirer immédiatement l'attention du lecteur, d'illustrer

l'ambiance d'un événement et de rendre la page plus vivante et attractive.


Le texte doit donc aller à l'essentiel. Pensez également à rédiger des phrases courtes et des paragraphes aérés. Un titre accrocheur, éventuellement un sous-titre, facilite la lecture et donne envie de poursuivre.

Enfin, choisissez des photos de qualité, variées et directement liées au sujet. Si vous n'avez pas de photo, je pourrai en trouver des génériques pour illustrer le sujet.

Pour faciliter la mise en page les textes doivent être envoyés au format pdf et les photos au format jpg.

Si vous voulez que votre article paraisse dans le journal à venir, pensez à l'envoyer avant la date limite indiquée sur la 1re page.

Merci d'avance de votre participation à la vie de notre gazette.



EŬROPA KONGRESO de ESPERANTO 2027

**en Carry-le-Rouet
Provenco • Francio**



**14-17
05•2027**

<https://kongreso2027.esperanto-france.org>
kongreso2027@esperanto-france.org





Universala Kongreso 2026

Plej bela kongresejo por plej koŝmara kongreso mia

Renée Triolle

Universala Kongreso en Graz estis mia 43 UK : neniam UK okazis en historia domo, ĝenerale ili okazas en modernaj konstruaĵoj, sed en Graz, la kongresejo situis en la historia kvartalo de urbo, neniam la salono Zamenhof estis orumita de pentraĵoj agnoskitaj de UNESKO pro sia beleco kaj unueco. La akustiko de la salono, kiu iĝis koncertejo (orgenoj kaj muzikaj aranĝoj) estis perfekta. Por mi persone, tiu kongreso estis koŝmara, ĉar mia valizo perdiĝis survoje, sekve mi havis nur la vojaĝkostumon por tuta semajno, ne havis elegantajn ŝuojn, tiel ke mi rezignis pri akcepto en la urbodomo pro ne taŭga kostumo! Krome post tre sukcesa antaŭkongreso en Vieno, pinĉis nervo kaj donis al mi konstantan doloron, kiam mi paŝas. Eĉ la titolo de Honora Membro de UEA ne povas

kompensi la malagrablaĵojn: mi ĉiam kontraŭis honorajn titolojn, sed nun mi konscias, kiom gravas por homoj: dekoj da amikoj aŭ nur konatoj gratulis surloke, aŭ sendis gratulmesaĝojn. Bone se mi povas iĝi modelo por la esperantistoj de la tuta mondo, mi nun konscias kiom mi ŝuldas al miaj gepatroj, kiuj pagis al mi, aliĝon kaj partoprenon al la UK, sola vera ebleco kompreni, kion signifas esti esperantisto kaj aparteni al tiu granda ronda familio, kiu harmonie kantas la himnon por pli paca mondo kaj kunvivado kaj interesiĝas pri mondaj problemoj (ĉijare la kongresa temo rilatis al volontulado kaj medio).

Provencanoj en Graz : venis homoj el Marseille, Aubagne, Saint-Raphael, La Ciotat, Lisle sur Sorgue. Josiane kaj Maite Prezioso per akordeono kaj tambureto animis la aperitivojn ludante muzikojn de la mondo, gratulojn kaj dankojn al ili. Iu konfesis, tie mi povas danci, dum la oficiala balo, mi estis tro laca !

Résolution du 111e Congrès mondial d'espéranto à Graz, Autriche, 1-8 août 2026

Le 111e Congrès mondial d'espéranto s'est tenu à Graz en 2026 sur le thème « Bénévolat et volontariat au service du développement durable », dans le cadre de l'Année internationale des bénévoles et volontaires pour le développement durable, proclamée par les Nations Unies. Ce congrès mondial, qui a lieu chaque année, est un exemple concret de coopération internationale bénévole : il est rendu possible grâce au travail dévoué de nombreux bénévoles de différents pays.

Depuis ses débuts, le mouvement espéranto est animé par l'engagement de bénévoles d'horizons divers et peut s'enorgueillir d'une longue tradition d'actions pour un monde meilleur. Ses valeurs – notamment le respect des droits humains, la solidarité internationale, l'émancipation humaine et l'éducation transnationale – sont en par-

faite adéquation avec les Objectifs de développement durable (ODD) définis par les Nations Unies, également connus sous le nom d'Agenda 2030.

Partout dans le monde, les espérantistes et les organisations espérantistes contribuent déjà à

la réalisation de ces objectifs par des actions dans les domaines de l'éducation, de la culture, de l'inclusion sociale, de

l'égalité des genres, du respect de la nature, de la protection

de l'environnement, de

la solidarité internationale, de la consolidation de la paix et autres, en associant souvent l'action locale à l'action mondiale. Le Congrès constate que le chemin vers la réalisation des Objectifs de développement durable est encore long et que les décideurs les ignorent souvent.

Le Congrès déplore la tendance actuelle à la repolarisation du monde



Universala Kongreso 2026



en zones d'influence qui privilégient le mensonge, l'intimidation et le règlement des déséquilibres par la force et la guerre, plutôt que par le dialogue et le respect du droit international.

Le Congrès exprime son soutien au rôle central des Nations Unies dans la coordination de la coopération internationale en faveur du développement durable et exhorte les États membres à lui fournir les ressources, les compétences et le soutien politique nécessaires pour qu'elle puisse remplir efficacement ce rôle.

Le Congrès attire l'attention en particulier sur les aspects linguis-

tiques des Objectifs de développement durable, notamment en ce qui concerne l'utilisation équitable des langues pour une éducation de qualité, la réduction des inégalités et l'accès à la justice.

Enfin, le Congrès invite tous les espoirantistes à concrétiser l'aspiration de ce Congrès par des actions et des projets en faveur des Objectifs de développement durable, et à utiliser l'espéranto plus fréquemment et plus consciemment, y compris de façon novatrice, comme langue de travail de la coopération civique internationale.

Graz, Autriche, le 8 août 2026

ne peut être atteint que par la pratique, se sont depuis longtemps regroupés autour de l'espéranto et œuvrent à sa diffusion et à l'enrichissement de sa littérature.

3. Puisque l'auteur de l'espéranto a, dès le début, renoncé une fois pour toutes à tout droit personnel et privilège sur cette langue, l'espéranto n'est la « propriété de personne », ni matériellement ni moralement. Le maître matériel de cette langue est le monde entier, et quiconque le souhaite peut publier dans ou à son sujet toutes les œuvres qu'il souhaite, et l'utiliser à toutes fins; les personnes reconnues par les auteurs espérantistes, parmi les meilleurs et les plus talentueux, seront toujours considérés comme leurs maîtres spirituels.

4. L'espéranto n'a pas de législateur personnel et ne dépend d'aucune personne en particulier. Toutes les opinions et œuvres du créateur de l'espéranto ont, comme celles de tout autre espérantiste, un caractère strictement personnel et n'engagent personne. Le seul fondement de la langue espéranto qui lie définitivement tous

les espérantistes est le « Fundamento de Esperanto », un petit ouvrage auquel nul n'a le droit d'apporter la moindre modification. Si quelqu'un s'écarte des règles et des modèles énoncés dans cet ouvrage, il ne pourra jamais se justifier par l'expression « tel est le souhait ou le conseil de l'auteur de l'espéranto ». Comme cela se fait dans toute autre langue, une idée qui ne pourrait être exprimée de manière appropriée par le contenu du « Fundamento de Esperanto » rend libre tout espérantiste de l'exprimer de la manière qui lui semblera la plus appropriée et la plus juste. Mais dans l'intérêt de l'unité de la langue, il est recommandé à tous les espérantistes d'imiter autant que possible le style propre à l'œuvre du créateur de l'espéranto, celui qui a le plus œuvré pour et en espéranto et qui en connaît le mieux l'esprit.

5. Est espérantiste toute personne qui connaît et utilise l'espéranto, quels que soient les objectifs poursuivis. Bien que non obligatoire, l'appartenance à une association espérantiste active est recommandée pour tout espérantiste.

Lingvaj malfacilaĵoj survoje al la UK

Thierry Spanjaard

Lastan someron, pluraj el la membroj de Esperanto-Provence partoprenis en la Universala Kongreso (UK) en Graco (Graz) en Aŭstrio. Tie, ni ĝoje deĵoris en la budo de Esperanto-Provence dum la Movada Foiro,



kie ni aktive varbis por la ĉefaj internaciaj agadoj de nia federacio: la Mediteranea Esperanto Semajno (MES) kaj la Eŭropa Kongreso de Esperanto (EK27). Pluraj el la membroj de Esperanto Provence ankaŭ partoprenas en la LKK (Loka Kongresa Komitato) de EK27, do ni prezentis la projekton dum sukcesa informseŝio: estis pli ol 100 spektantoj en tiu programero.

Membroj de Esperanto Provence, kiuj partoprenis la UK-on elektis diversajn vojojn kaj transportrimedoj por atingi Gracon. Mi elek-

tis malrektan vojon ĉar, vidita de Marsejlo, ĉio en Germanio kaj Aŭstrio aspektas apude. La malfruoj de trajnoj de la germana trajnentrepreno (Deutsche Bahn) pruvis ke mi eraris.

La unua parto de mia vojaĝo inkluzivis kelkajn tagojn da restado en Lepsiko (Leipzig) kaj en Dreseno (Dresden).

En ambaŭ urboj, mi havis la ŝancon renkonti lokajn esperantistojn. En Lepsiko, mi renkontis Willi, David kaj Rasa, kiuj evidentigas la internaciecon de esperantistoj: tiuj tri homoj havas almenaŭ kvar naciecojn: argentina, usona, litova kaj germana.



Estis granda plezuro por mi babili kun ili kaj, tiel, pli bone kompreni la historion de Lepsiko, aparte la plej gravaj momentoj de la 20-a jarcento:



Universala Kongreso 2026

la naziismo, la komunista epoko kaj la reunuiĝo. Iliaj komentoj alportis kroman kaj pli vivan informon kompare kun tiu kiun oni povas lerni en libroj aŭ vidi en muzeoj. Krome, ili proponis al mi viziti Völkerschlachtdenkmal, kiu estas taŭga ekzemplo pri la malfacilaĵo de la germana lingvo: tiu signifas «Monumento al la Batalo de la Nacioj», kaj estas memoraĵo pri batalo kiu okazis en 1813 kie la imperia armeo de Napoleono estis venkita de trupoj de la aliancitoj Aŭstrio, Prusio, Rusa Imperio kaj Svedio.



En Dresdono, mi renkontis Rolf, kiun mi konas jam de jaroj. Ni promenis kune en la urbo kaj li alportis al mi novajn informojn pri kion mi vidis en la urbo. Dresdono estis la ĉefurbo de la Elektprinclando Saksio kaj poste de la reĝlando Saksio de la 14-a ĝis la 20-a jarcento. Pro tio klasikaj kaj barokaj konstruaĵoj abundas en la urbo. Sed je la fino de la Dua Mondmilito, triono de Dresdono estis

detruita en februaro 1945, dank al bruligaj kaj eksplodemaj bomboj de la brita kaj usona armeoj. Vizitante kun Rolf, li klarigis al mi, ke ĉiuj monumentoj fakte estis rekonstruitaj je la fino de la 20-a kaj la komenco de la 21-a jarcentoj. Fronte de konstruaĵoj, li komentis : «Tiu estas 20 jaraĝa», «Tiu estas 15 jaraĝa», ktp.

Poste, kaj daŭre survoje al Graco, mi pasigis unu semajnon de (nuda) piedirado en Turingio. La afero estis bone organizita de lokulo. Sed, la plejparto de la partoprenantoj estis germanoj kaj sufiĉe multe inter ili ne regis fremdajn lingvojn. Ni estis nur tri eskerlandanoj (du francoj kaj unu singapurano), kiuj ne komprenis la germanan. Dum la tuta semajno mi bedaŭris, ke ne ĉiuj sciopovas la internacian lingvon. Eĉ se la piediradoj estis agrablaj kaj en belaj pejzaĝoj, havi pli da konversacioj kun la aliaj partoprenantoj mankis al mi! Tiu evidentiĝas ke senĉese, ni devas varbi por Esperanto por krei pli bonan mondon en kiu ĉiuj povos facile interkompreni!

Fine, mi alvenis en Graco, kie vivas la varma Esperanto-Etoso de la Universala Kongreso!

Universala Kongreso 2026




Persona gazeto de fervora esperantisto iom kiel Edmond PRIVAT en 1905

Pascal Panarotto

Mi alvenis en la loko de la universala kongreso en

GRAZ (Austrio) kaj vidis kun ĝojo la verdan flagon, mi renkontis homojn kaj ni diris spontane «saluton, kiel vi fartas», mi komprenis tuj ke mi estis en la «planedon» Esperanto.

sola, kiam la prezidanto diris ke Renée TRIOLLE, mia profesoro de Esperanto dum tri jaroj estis «honora membro de UEA».



Sabaton

Vesperon : Ateliero por la unuafojaj kongresanoj en UK libroservo, kiel libroj pri Esperanto...! Movado foiron por prezenti diversajn aktivajn ĉirkaŭ la lingvo.

Dimancon

Matenon : inaŭguro kun paroladoj, omaĝoj, mi stariĝis kaj aplaudis,

Jen la foto de pli ol 1072 kongresanoj el 63 landoj.

Vesperon : vizito de muzeo pri folkloro en Aŭstrio, reveno en la salonoj de UK kaj aŭdis teatraĵon : Stephan SWEIG «ŝakludo» (antaŭe mi legis la biografion de la aŭtoro «le monde d'hier »)

Lundon

Proverboj en esperanto; Teo ceremonio; Strategio de UEA; Balo (kun valsoj de Vieno evidente !);

Universala Kongreso 2026


Mardon

Al en la futuro; faktoj pri historio de Aŭstrio; Modernarto muzeo en GRAZ; Koncerto en esperanto (mi aŭdis diversajn kantantojn)



Merkredon

Libera tago, mi vizitis la historikan Gracon (gotiko ĉefe) kaj mi iris en la muzeo de la milito, mi en mi mem diris «kiom la homo estas imagema por la milito, se li estus same por la paco la mondo estus tre bela»;



Jaŭdon

Ateliero «UEA respondas» mi demandis ĉu ni povus eliri de la imperialismo de Usono, mi ankoraŭ aten-

das la respondon...; Ateliero pri la akademio de Esperanto (tre interesa ili vivigas la lingvon);

EDE la esperanta politika partio; la preparado de la resoluzio de la kongreso 2026;

Vendredon

Ateliero «muziko en Aŭstrio» mi pensis spontane pri Mozarto !

Mirinde, la profesorino parolis pri ses malkonataj muzikistinoj kiuj estis junaj (ses jaroj kelkfoje) muzikistoj, mi vidis ankoraŭ unuafoje la nevideblecon de la virinoj antaŭ, kaj hodiaŭ????

Ni prezentis la «European Kongreson» en Carry le Rouet (Francio) en aprilo 2027 (vi trovos reklamon en tio gazeto) ; vizito de stratarto en la urbo de GRAZ ;



Sabaton

Jam la fino ; Bedaŭrinde!

Falsaj amikoj

Jen listo de falsaj amikoj en la franca
(verkis Frédéric Gilles)

Ne konfuzi kun

Esperanto vorto	Franca traduko	Esperanto vorto	Franca traduko
kankro	<i>écrevisse</i>	lernantaĉo	<i>cancre</i>
puto	<i>puits</i>	putino, ĉiesulino,	<i>pute, prostituée</i>
		malĉastitino,	
		amoristino	
rado	<i>roue</i>	floso	<i>radeau</i>
pulo	<i>puce</i>	pulovero	<i>pull</i>
skolopo	<i>bécasse</i>	skolopendro	<i>skolopendre</i>
grilo	<i>grillon</i>	kradrostilo	<i>grill</i>
		krado	<i>grillage, grille</i>
stablo	<i>tréteau</i>	stabila	<i>stable</i>
sorbi	<i>absorber</i>	sorpo	<i>sorbe</i>
marto	<i>mars</i>	martelo	<i>marteau</i>
kalko	<i>chaux</i>	paŭsaĵo	<i>calque</i>
malo	<i>contraire</i>	malbono	<i>mal</i>
judo	<i>juif</i>	ĵudo	<i>judo</i>
barilo	<i>clotûre, barrière</i>	barelo	<i>baril, tonneau</i>
raketo	<i>fusée</i>	rakedo	<i>raquette</i>
koto	<i>boue</i>	flanko	<i>côté</i>
vanta	<i>frivole, superficiel</i>	fanfaroni	<i>se vanter</i>
palmo	<i>palmier</i>	palmobranĉo	<i>palme (feuille du palmier)</i>
		naĝilo	<i>palme (pour nager)</i>



Ne konfuzi kun

Esperanto vorto	Franca traduko	Esperanto vorto	Franca traduko
rando	<i>bord, extrémité</i>	ekskurso	<i>randonnée</i>
femuro	<i>cuisse</i>	femurosto	<i>fémur</i>
loto	<i>tirage au sort</i>	lojto	<i>lotte</i>
melo	<i>blaireau</i>	melono	<i>melon</i>
petoli	<i>batifoler, gambader</i>	furzi en lito	<i>péter au lit</i>
veto	<i>pari</i>	vetoo	<i>véto</i>
mulo	<i>mulet</i>	bestkuracisto	<i>vétérinaire</i>
poligono	<i>blé noir, sarrasin</i>	muso	<i>mulot, souris</i>
napo	<i>chou navet</i>	plurlatero	<i>polygone</i>
mato	<i>natte, paillason</i>	tablotuko	<i>nappe</i>
kilo	<i>quille (de bateau)</i>	matematiko	<i>maths</i>
turto	<i>tourterelle</i>	kilogramo	<i>kilogramme</i>
pavo	<i>paon</i>	torto	<i>tourte</i>
vilo	<i>villosité</i>	papavo	<i>pavot</i>
verto	<i>sommet de la tête</i>	urbo	<i>ville</i>
reklami	<i>faire de la publicité</i>	verda	<i>vert</i>
		reklamacii	<i>réclamer</i>



La karotoj estas preskaŭ kuiritaj, sed ne Esperanto

Marc Gallardo

Dum jaroj, la baldaŭa morto de Esperanto estas anoncita. Ĉi tiuj anoncoj estas tiel oftaj, ke ni komencas demandi nin: kio se Esperanto ne aŭskultas la novaĵojn?

Por montri, ke la rezisto daŭras, jen kelkaj sekretaj mesaĝoj por aŭskulti kaŝe:

Ĉi tie en Londono...

La karotoj estas kuiritaj. La violonoj ploras jam delonge aŭtune. La brasikoj estas en danĝero. Sed ne timu!

La verdaj steloj ankoraŭ brilas. Vortaroj estas kaŝitaj en tirkestoj. Lernolibroj cirkulas kaŝe.

Kaj tra la tuta mondo, malgrandaj grupoj de esperantistoj daŭrigas la batalon...

Mesaĝo por amikoj en Marsejlo:
La terpomo estas verda. La tero estas blua kiel oranĝo.

Mesaĝo por parizanoj, kiuj dividas niajn kredojn:

La kato ankoraŭ ne manĝis la kanarion. Sed Gros Minet la kato rigardas Tweety.

Mesaĝo por la grupo de Graz:

La karotoj estas ne nur kuiritaj, sed ili jam estas en la salato!

Mesaĝo por grupo de La Ciotat:
Bauco, la verda apro, klarigas: li serĉas petrolon en la ĝardeno. La kavaliro havas siajn piedojn en la akvo kaj lia vojo estas plena de fiŝoj.

Mesaĝo por la Sardingrupo:

S-ro Molinari estas atendata ĉe la enirejo de la malnova haveno. Li tre malfruas.

Kaj se iu demandas: «Ĉu Esperanto ankoraŭ vivas?» Respondu trankvile: «Kompreneble. Ni eĉ ankoraŭ havas kunvenojn, kongresojn, gazetojn... kaj homojn provantajn klarigi al aliaj kio estas Esperanto!»

Ĉi tie en Londono.

Fina mesaĝo al ĉiuj esperantistoj:
Ne senkuraĝiĝu! La lingvo vivas. Humuro vivas kaj fartas bone. Kaj la karotoj... estas ankoraŭ bone kuiritaj!

Fino de la mesaĝo. Ne ripetu ĝin!
La mesaĝo memdetruigos post aŭskultado.

Recepto por Provenca Daŭbo de Avino - Rosy Inaudi

La Rakonto de Popola Plado : Daŭbo estas, ĉefe, la rakonto de ordinaraĵoj. Ĉi tiu plado originis en la 19-a jarcento el la bezono de ĉaristoj, kiuj bezonis abundan manĝon, kiu bone konserviĝus dum siaj longaj vojaĝoj. Ĉi tiu tradicia recepto naskiĝis el ĉi tiu neceso: transformi malmultekostan viandon en reĝan festenon per pacienca kaj scio. Ĉi tiu recepto, por 6-8 homoj, donos al vi daŭbon indan je la plej bonaj provencaj tabloj.

Ingrediencoj

Por la viando:

• 2 kuleroj da olivoleo

• 2 kg da bovaĵo (miksita vango kaj bovaĵo)

• Salo kaj freŝe muelita pipro

Legomoj kaj herboj:

• 3 grandaj cepoj, maldike tranĉitaj • 4 karotoj, tranĉitaj en dikajn rondojn

• 6 ajleroj, dispremitaj

• 3 kuleroj da tomata pasto

• Ŝelo de unu organika oranĝo (sen la blanka parto!)

• 1 bukedo garni (timiano, laŭrofolio, rosmareno, petroselo)

• 5 fasketoj

• 1 kulereto da juniperoj

Por la sekreta saŭco:

• 600 ml da tre riĉa bovaĵa buljono

• 3 kuleroj da balzama vinagro

• 200 ml da pura ruĝa vinbersuko

• 20 g da rehidratigitaj sekigitaj fungoj • 100 ml da malvarmigita nigra kafo

Paŝo post paŝo preparo

Paŝo 1: Rostado (15 minutoj): Tranĉu vian viandon en grandajn 5 cm kubojn. En via gisfera kaserolo, varmigu la olivoleon kaj bruligu la viandon sur ĉiuj flankoj. Ĉi tiu paŝo estas decida: ĝi disvolvas la sukojn, kiuj aromigos vian saŭcon.

Paŝo 2: Ŝvitado de la Aromoj (10 minutoj): Forigu la viandon kaj saŭtu la cepojn ĝis ili fariĝos travideblaj. Aldonu la ajlon, poste la tomatan paston. Kuiru dum 2-3 minutoj, foje kirlante: ĝi devus odori mirinde!

Paŝo 3: La Magia Deglazurado: Verŝu vian riĉan buljonon miksitan kun balzama vinagro kaj vinbersuko. Bone skrapu la fundon de la kaserolo por malfiksi ĉiujn brunigitajn pecetojn. Aldonu la kafon kaj la tremplikvaĵon de la rehidratigitaj fungoj.

Paŝo 4: Kunmetado: Remetu la viandon al la kaserolo, aldonu la karotojn, oranĝan ŝelon, bukedon garni, fasketojn kaj rehidratigitajn fungojn. La likvaĵo devus apenaŭ kovri la viandon.

Paŝo 5: Malforte boligi (3-4 horoj). Kovru kaj baku je 120°C (250°F) aŭ malforte boligi je tre malalta fajro. La stufaĵo neniam bolu, nur milde simeru. Ĉi tiu malrapida kuirado transformas la kolagenon en gelatenon kaj koncentras ĉiujn gustojn. Bonan apetiton!



À noter sur votre agenda



Dans notre fédération

Les cafés linguistiques “esperanto” :

2^e mardi de chaque mois - 19h - Marseille (13)

Grande Librairie Internationale de Marseille

3 rue Vincent Scotto, 13001 Marseille

infos : Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51

Dernier jeudi de chaque mois - 17h - Lorgues (83)

“Carnets de voyage” - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

infos : Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02

Les cours d’Espéranto à Marseille :

Le jeudi - 18h - Cours débutants

Maison des Associations - 93 La Canebière

Le mardi - 18h - Cours avancé et conversation

Maison des Associations - 93 La Canebière

7-8 novembre 2026 - La Garde (83) : Kultura Semajnfino

infos : Marc Gallardo - 06 09 89 09 14 - gallardomarc@ymail.com

<https://provenco.esperanto-france.org/2026-11-7-8-Stage-a-La-Garde-83>

13-20 mars 2027 - Les Issambres (83) : Mediteranea Esperanto-Semajno

infos : Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51

<https://provenco.esperanto-france.org/2027-03-13-20-Mediteranea>

14-17 mai 2027 - Carry-le-Rouet (13) : Eŭropa Kongreso de Esperanto

<https://kongreso2027.esperanto-france.org>

En France

Pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs

Baugé (49) - Château de Grésillon

<http://gresillon.org/?lang=fr>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org>

20-30 oct. 2026 - Grésillon (49) : stage «Aŭtunas»

<http://gresillon.org/?lang=fr>

19-23 oct. 2026 - Bouresse (86) : tradukado (preparo al FEI ekzameno)

<http://www.kvinpetalo.org>

Ailleurs en Europe et dans le monde

11-15 nov. 2026 - Lucca (Italie) : ZAT Zamenhofa Aranĝo Toskana 2026

<https://zat.kongreso.org/>